

# Boletín

DE LA FEDERACION ESPAÑOLA DE ESPERANTO

## VIGO KONGRESURBO POR 1972



•El Berbés•, Monumento al la Fiŝkaptisto.

**BOLETIN DE LA FEDERACION  
ESPAÑOLA DE ESPERANTO**

**Director:**

Domingo Martínez Benavent

**Redacción y Administración:**

Inés Gastón

Paseo Marina Moreno, 35, 4.º, dcha.  
ZARAGOZA

**ADRESOJ**

Hispana Esperanto-Federacio:

Prezidanto:

S-ro Angel Figuerola Auque  
Str. Víctor de la Serna, 19, 7.º

MADRID-16

Generala korespondado:

Sekretario:

S-ro Manuel Figuerola Palomo  
Str. Víctor de la Serna, 19, 7.º

MADRID-16

Monsendoj:

Kasisto:

S-ro Gerardo Flores Martín  
Str. Presidente Carmona, 2

MADRID-2º

Ĉekkonto: N.º 8362-271

Banko Español de Crédito  
Str. Diego de León, 54

MADRID-6

Libroservo:

Hispana Esperanto-Federacio  
Str. Rguez. S. Pedro, 13, 3.º desp. 7

MADRID-8

Sendajoj pri statistiko kaj

informado al:

S-ro Salvador Aragay  
Str. Bassegoda, 40, 3.º, 1.ª

BARCELONA-14

Eldona-Fako:

F-ino Inés Gastón

P.º Marina Moreno, 35, 4.º, dcha.

Ĉekkonto: N.º 17917, Banco Bilbao  
Coso, 31

ZARAGOZA

Jarkotizo por eksterlando: 120 ptojn.

La enhavo de la artikoloj ĉi tie publikigitaj ne reprezentas la oficialan opinion de H.E.F., escepte en okazo de oficiala komuniko; ĝi ankaŭ ne reprezentas la opinion de la Redaktoro; do, pri la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.

**de Secretaría**

**DONANTES DEL FONDO DE ADQUISICION LOCAL EN PROPIEDAD**

(F. A. L. P.)

pesetas

Saldo anterior ... ..	85.600
Félix Gómez ... ..	850
Cecilio Olalla ... ..	500
Vidal Fernández ... ..	500
Juan Régulo Pérez y familia .	500
Miguel Sender Brota ... ..	1.000
Guillermo Bosch Fornals ... ..	1.000
María Luisa Mexía y Marcelina Palomo ... ..	500
Grupo Esperantista de Tenerife ... ..	500
Cinco samideanos del Grupo de Tenerife ... ..	500
Venancio Monsalve ... ..	500
Gerardo Flores Martín ... ..	5.000
Pedro Nuez ... ..	700
Hispana Esperanto Auroro ... ..	5.000

Total ... .. 102.650

Madrid, 24 de abril de 1972

MANUEL FIGUEROLA PALOMO

Secretario de la Federación Española  
de Esperanto

**deziras korespondi**

POLLANDO. — Ploty, woj. Szczecin, Poštrestante 20, S-ino Anna Siwinska, eksinstruistino, deziras korespondi kun gesamideanoj el okcidentaj landoj.

Mendu jam:

Belajn poŝtkartojn de la 32.ª Hispana Kongreso de Esperanto, unuo ... 3 ptoj.;  
Folietoj de glumarkoj de la 32.ª Hispana Kongreso de Esperanto, unuo ... 3 ptoj.

**Cursos de Esperanto por Correspondencia**

de la

**Federación Española de Esperanto**

Centro Autorizado por el Ministerio  
de Educación y Ciencia  
con el número 68

c. Forn, 21 - MOYA (Barcelona)

## LLAMADA DEL PRESIDENTE DE LA FEDERACION ESPAÑOLA DE ESPERANTO, A TODOS LOS SOCIOS CON MOTIVO DEL XXXII CONGRESO ESPAÑOL DE ESPERANTO

La Federación Española de Esperanto, como sucesora y depositaria de los anhelos e ideales de la Asociación Española, su antecesora, sigue la tradición de organizar cada año, siempre que es posible un Congreso de Esperanto a escala nacional, cuya finalidad en el momento actual, consiste en reunir periódicamente una representación del Movimiento Esperantista Español, más o menos amplia según lo favorable o desfavorable que en cada caso resulten circunstancias diversas; celebrar la Junta General de la Federación con cierta garantía de asistencia por parte de los socios, base para que su labor resulte eficaz; tomar conciencia de los problemas que tiene planteados el Movimiento Esperantista Español, a fin de buscar las soluciones adecuadas; proporcionar la posibilidad de vivir una experiencia activa del valor del Esperanto como lengua viva, a cuantos pueden asistir a los Congresos o presenciar la marcha de los mismos; establecer y fortificar vínculos de amistad entre los esperantistas, y estimular entre los congresistas su decisión de mantener una contribución de apoyo moral y económico a los fines de la Federación que se sincronizan con los del Movimiento Esperantista Español, y patentizar con todos los medios que la Federación encuentra a su alcance, que el Esperanto es una realidad de trascendencia social, que se afirma en el mundo más sólidamente cada día, ganando extensión, densidad y riqueza espiritual, apesar de los obstáculos que se le oponen a cada paso, no siendo los menores, la indiferencia o la ansiedad causadas en nuestro tiempo, por las exigencias de la vida moderna, y en particular por la falta de recursos económicos, indispensables hoy, más que nunca, para la promoción de toda empresa.

Treinta y dos Congresos Españoles de Esperanto incluyendo el que se celebrará en la hermosa y laboriosa ciudad de Vigo, en los días del 20 al 25 del próximo julio, al que me permito invitar rogando su asistencia, a todos los esperantistas españoles y simpatizantes, con la certeza de que van a asistir a un acontecimiento esperantista memorable, constituye un hecho realmente importante, cuya significación no ha sido hasta la fecha suficientemente valorada, ni siquiera por los esperantistas. Pues estos congresos son manifestaciones de alto valor cultural; de convivencia social espontánea, y de auténtico idealismo desinteresado.

Cada Comité Local Organizador, una vez aprobada su constitución por la Federación, de quien depende, por ser ésta el alma de los congresos, tiene el noble anhelo de querer realizar algo que sea inigualable, que supere a todo lo ya realizado anteriormente. Y lo verdaderamente admirable, es que el esfuerzo de estos comités, se ve siempre coronado por el éxito. Los esperantistas asistentes, año tras año a los congresos, no sin sacrificio muchas veces, aunque con gran carga del entusiasmo necesario para vencer toda clase de inconvenientes, en modo alguno se ven defraudados, sino que por el contrario, puede gozar la ilusionante realidad anhelada por sus organizadores.

Así pues, la asistencia a los Congresos de Esperanto plantea en cada caso una incógnita, una inquietud. Y de conformidad con este orden de cosas, después de haber asistido al XXXI Congreso Español de Esperanto, en Alicante, de gran importancia por muchos factores a considerar, señaladamente, por la recepción de los congresistas y rotulación de una magnífica calle con el nombre de "Esperanto", en la sin par ciudad turística europea, Benidorm. *¿Qué sorpresa reserva a los esperantistas españoles el XXXII Congreso Español de Esperanto?*

En el ánimo del Comité Local Organizador de este Congreso, particularmente, en el de su Presidente, don Arturo Moreira, hombre de notable personalidad, y entusiasta esperantista, impera el ambicioso deseo de ofrecer el mejor de los Congresos hasta ahora celebrados; loable ambición. En mi ánimo como Presidente de la Federación Española de Esperanto y creo que en el de todos los que han hecho intención de asistir a este Congreso, reina la esperanza, sin lugar a duda, de que vamos a participar en un Congreso que dejará en nuestra alma recuerdos imborrables y que vendrá a constituir un nuevo eslabón valioso en la cadena de estos acontecimientos.

Galicia, y concretamente la provincia de Pontevedra, acogerá por segunda vez a los esperantistas españoles, llegados a esas ubérrimas tierras llenas de historia y tesoro de España, para celebrar sus Congresos. La primera fue la ciudad de Pontevedra, en julio de 1960, la segunda será la histórica Vigo.

Notables son los encantos que ofrece la fisonomía de su paisaje formado por los rasgos peculiares de su cielo, sus montañas próximas y sus bellísimas rías. Sumo interés ofrece su puerto natural, activo e inmenso, seccionado en tres: el de viajeros, el comercial y el pesquero; sus importantes industrias y sus museos. Y sobre todo, la psicología humana de sus gentes, la percepción de la suave y dulce sonoridad de la lengua gallega, reflejo de las virtudes idóneas de sus habitantes entre las que destaca su entrañable hospitalidad.

La Federación, desde el momento en que fue elegida esta ciudad de ambiente a la vez íntimo y cosmopolita, balcón del mundo atlántico, consideró, después de haber tomado contactos con motivo de los dos últimos Congresos con las maravillosas tierras españolas varias en su unidad, que son la Costa Verde y la Costa Blanca con sus típicas producciones, genuinamente españolas del turrón y la sidra, que Vigo con su marco natural maravilloso era el más adecuado para ser sede del XXXII Congreso Español de Esperanto.

En suma, para que este Congreso responda a las ilusiones preconcebidas por sus organizadores y el interés puesto en él por la Federación, el Presidente reitera su ruego a todos los esperantistas españoles y simpatizantes, de que con su asistencia garanticen el éxito del Congreso para fomentar el progreso del Movimiento Esperantista Español y la aplicación en su consecuencia del Idioma Internacional Neutral "Esperanto" en todos los medios sociales de cara a las relaciones internacionales.

## RESULTADOS OBTENIDOS EN EL ESCRUTINIO DE VOTOS REALIZADO PARA CUBRIR DOS PUESTOS VACANTES EN LA JUNTA DIRECTIVA DE LA FEDERACION ESPAÑOLA DE ESPERANTO

Total de votos emitidos ... .. 146

### RESULTADOS DE LA ZONA NORTE:

Sr. D. Juan Azcuenaga Vierna de Santander ... ..	38
Sr. D. Alcibiades González Meana de La Felguera (Asturias) ... ..	22
Sr. D. Julio Juanes Sainz de Bilbao ... ..	54
Sr. D. Santiago Mulas Gallego de Gijón ... ..	31
Nulos ... ..	1

### RESULTADOS DE LA ZONA DE LEVANTE, ANDALUCIA E ISLAS CANARIAS:

Sr. D. Rodolfo Canet Marín de Alicante ... ..	68
Sr. D. Juan Devis Calpe de Valencia ... ..	70
Nulos ... ..	8

### CANDIDATOS PROCLAMADOS NUEVOS DIRECTIVOS DE LA FEDERACION:

Por la zona Norte, Sr. D. Julio Juanes Sainz.

Por la zona de Levante, Andalucía e Islas Canarias, Sr. D. Juan Devis.

Madrid, 8 de marzo de 1972

El Secretario de la Junta Directiva

MANUEL FIGUEROLA PALOMO

*Con satisfacción comprobamos que como era de esperar han sido elegidos como vocales de la Junta Directiva de la Federación, don Julio Juanes Sainz y don Juan Devis Calpe, pertenecientes a los Grupos Esperantistas de Bilbao y Valencia respectivamente. Grupos de verdadera solera esperantista, ya que eu de Bilbao es el más antiguo en España y el de Valencia el que llevó a cabo la reorganización del movimiento esperantista actual a escala nacional.*

*Nuestra felicitación a los nuevos directivos con nuestro agradecimiento por haber aceptado el que fuera presentada su candidatura.*

RED

# EN LA 18<sup>o</sup> DE MAYO, TAGO DE BONA VOLO

*Denove la junularo de Kimrujo sendis por la junularo de la mondo sian jaran mesaĝon de bona volo okaze de la 18-a de majo 1972, Tago de Bona Volo.*

*Kiam vi legos la mesaĝon —kiun oni disaŭdigos per radio ĝustatempe— la 18-a de majo estos jam forpasinta, sed, espereble, via spirito ĉiam bonvola, akceptos kaj reciprokos la mesaĝon tutkore kun la deziro por la junularo de Kimrujo, de plej granda sukceso en ĝia homarama laboro.*

## MESAĜO DE BONA VOLO

La kvindek-unua Ĉiujara Bonvolmesaĝo de la junularo de Kimrujo al la junularo de la mondo, radie disaŭdigota je Bonvoltago, la 18-a de Majo, 1972.

Jen Kimrujo! Salutojn de la junularo de Kimrujo al la junularo de la mondo, je Bonvoltago.

Nuntempe, en mondo kie troviĝas tiom da konfliktoj kaj tiraneco, malsano kaj malriĉeco, malĝojo kaj soleco, gejunuloj ĉie fortege deziras helpi la homaron kaj krei pli justan socion.

La estonteco estas la nia. Estas nun, kiam oni devas ekkonstrui la morgaŭan mondon. Ĉi tiu tasko bezonas klaran pensadon kaj sanan korpon. Dum iuj pretadas gajni per la malfortecoj de siaj kunuloj, oni devas senlace sin gardi kontraŭ ĉio, kio koruptas la menson, kaj sapeas la homan dignon.

Ni ankaŭ disciplinu nin malakcepti ĉion, kio malutilas la korpon, por ke ni povu plenumi nian taskon por la plenforteco kaj energio de la juneco.

Ĉu vi kunlaboros por krei tian estontecon? Ju pli ni sukcesos, des pli ni povos antaŭĝui pli puran kaj pli bonan mondon, por interkompreno kaj reakordigo, por paco kaj bonvolo.



Denove ĉi-jare, la Oficiala kaj Internacia Specimena Foiro de Barcelona eldonis propagandan afiŝon en Esperanto. Ni dankas al la Direkcio de tiu grava Foir-konkurso, ĝian rekonon de la Internacia Lingvo.

## ESPERANTO KAJ SOCIOLOGIO

Jus aperis grava sociologia studo pri "Esperanto kiel socia kaj lingva movado", verkita de juna brita sociologo, Peter G. Forster. S-ro Forster, kiu laboras en la Universitato de Hull, estas kunlaboranto de la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo (CED)-la institucio, kiun U. E. A. starigis antaŭ precize 20 jaroj.

Sociologia studo de S-ro Forster pri la brita Esperanto-movado jam aperis kiel dokumento C/I/2 de CED en la angla kaj en Esperanto. Lia nova studo estis preparita por la 7.<sup>a</sup> Monda Kongreso de Sociologio kaj prezentita tie, en Varna (Bulgarujo), en 1970. Nun ĝi aperis dulingve, en la angla kaj itala, en la lingvistika revuo *Pensiero e linguaggio in operazioni/Thought and language in operations* (Milano), vol. II, n-ro 7/8. En la sama numero de tiu revuo aperas tutpaĝa anonco pri la revuo de CED *La Monda Lingvo-Problemo*.

## TRIOBLA AŬSPICIO

Tri aranĝoj en Eŭropo en la somero de 1972 ĝuos la aŭspicion de Universala Esperanto-Asocio: Somera Esperanto-Universitato en Gyula (Hungarujo), Hungara Kultur-Festivalo en Budapeŝto kaj Sveda Somera Semajno en Frostavallen. La datoj de tiuj aranĝoj estas tiaj, ke eĉ estus eble partopreni ĉiujn tri-kaj la programoj certe invitas fari tion!

La Somera Esperanto-Universitato en Gyula estas jam la deka, do jubilea, en serio, kiu konatiĝis internacie pro sia alta nivelo. Inter la 9.<sup>a</sup> kaj 15.<sup>a</sup> de julio, prelegantoj diversnaciaj pritraktos plej variajn temojn-de Shakespeare ĝis gastronomio. Prospekton sendas SEU, TIT, 48-as u. II, Gyula, Hungarujo.


Tuj sekvas la Hungara Kultur-Festivalo en Budapeŝto, de la 17.<sup>a</sup> ĝis la 23.<sup>a</sup> de julio. La program-kajero, ricevebla ĉe Hungara Esperanto-Asocio (Budapeŝto 5, Pf 193), anoncas abundan regalon per eroj muzikaj, belartaj, literaturaj, filmaj, teatraj, ktp krom ekskursoj, fakaj kunsidoj k.a.

Restas sufiĉe da tempo por salti al Svedujo, kie ekde la 30.<sup>a</sup> de julio ĝis la 6.<sup>a</sup> de aŭgusto okazos en la fama Frostavallen la Sveda Somera Semajno-revivo de la aranĝo, kiu havis tiom da sukceso en pli fruaj jaroj. En idilia ĉirkaŭaĵo (kaj novkonstruita hotelo) la partoprenantoj povos sekvi seriozan programon de prelegoj pri "La problemo de lingva komunikado" (prof. Lapenna, d-roj Bormann kaj Wells, s-ro Thierry), diskutoj, filmoj kaj aliaj eroj. Informas: J. Strönne, Amiralsgatan 36, S-211 Malmö, Svedujo.

## PLI DA SONBENDOJ

Kreskas la merkato por Esperantaj sonbendoj. Tion konstatas la Magnetofona Servo de UEA, kiu raportas, ke en la pasinta jaro 1971 ĝi vendis 121 programojn. La servo eĉ montris malgrandan profiton de ĉ. \$ 100. La mendoj venis el Usono, Kanado, Japanujo, Aŭstralio, Hispanujo, Nederlando, Finnlando kaj Nov-Zelando.

La Magnetofona Servo disponas nun pri 292 programoj. La uzantoj de la Servo povas elekti inter paroladoj de Ivo Lapenna, Edmond Privat kaj aliaj oratoroj, teatraĵoj kaj kantoj, programeroj de la Universalaj Kongresoj ekde Mainz 1958 ĝis la lasta en Londono-kaj eĉ la voĉon de d-ro L. L. Zamenhof mem, kopiitan de sur malnova vakscilindra registraĵo. Listo de ĉiuj disponeblaj bendoj —kune kun la tarifo kaj mendo-kondiĉoj— estas ricevebla ĉe la komisiito s-ro Rüdiger Eichholz, 2040 Springbank Road, Mississauga, Ontario, Kanado.



Vota Templo de l' Maro

Oni  
parolas  
nin  
de Vigo

Granda respondeco estas la efektivi-  
go de Kongreso, por la esperantistoj  
kiuj konsistigas la Lokan Kongresan  
Komitaton. Sed, estas tiel granda la  
entuziasmo, kiu regas inter la espe-  
rantistoj de Vigo, ke ni ĉiuj nin sentas  
L. K. K.-anoj pretaj kunlabori por ke  
la Kongreso estu plensukcesa.

Cio kion ni laboros por la triumfo  
de Esperanto, estos malmulte kompare  
al la valoro de la Internacia Lingvo  
kaj ties interna ideo; tial ni semas kaj  
semas konstante, kaj ni esperas, ke  
post la efektiviĝo de nia 32.<sup>a</sup> Hispana  
Kongreso de Esperanto, la semoj fruk-  
tigos.


Multe helpas nin en la organizado  
de la Kongreso, la apogo kiun donas  
al ni same la Aŭtoritatuloj kaj Estrar-  
oj de Publikaj kaj Privataj Instancoj,  
kiel la Radio kaj gazetistaro ĉiam pre-  
taj informi pri Esperanto kaj la Kon-  
greso.

Kompreneble, estas la Estraro de la  
Hispana Esperanto-Federacio, kiu fik-  
sas la —ni diru— laborprogramon de  
la Kongreso (laborkunsidoj, prelegoj,  
k. t. p.), kaj, la Loka Kongresa Komit-  
ato devas nur, adapti ĝin kune kun  
la festa programo.

La beleco de nia regiono estas ja  
rava, kaj ĝiaj moroj vere interesaj;  
pro tio, malfacile estis por ni elekti  
kion montri al niaj geamikoj, sed ni  
esperas ke la tuto estos plaĉa por ĉiuj  
kaj ripoziga por la spirito de tiuj, kiuj  
devos partopreni en ĉiuj laborkunsidoj.

Ni pensis ankaŭ pri la gejunuloj,  
por kiuj ni organizis specialan feston.  
Gis revido!!! Ni atendas vin!!!

EMILIO CRESPO CANO



Monto «Santa Tecla»  
El antikva kelta vilaĝo

Después de mi comentario en el último número de BOLETIN acerca de la "Fundación ESPERANTO", han sido varios los esperantistas que me han consultado si la Fundación aceptaría donativos para incrementar su capital y en consecuencia la labor a realizar, aun cuando estos donativos no sean de la cuantía necesaria como para establecer un premio.

Aunque naturalmente, yo he contestado a las personas que han preguntado, quiero en las páginas de BOLETIN dar una explicación general.

La "Fundación ESPERANTO" se constituyó en Zaragoza, bajo el patrocinio de la Federación Española de Esperanto y al amparo del artículo 31 de su Reglamento, siendo su objeto, la creación de premios y toda clase de estímulos para la enseñanza y difusión del idioma internacional Esperanto.

El capital fundacional fue pequeño porque pequeños eran los medios de que se disponían, debiendo ser incrementado ese capital por las donaciones o legados que se le hicieren y por el cinco por ciento del saldo activo que arroje cada año el balance de la Federación. Por lo tanto, el Patronato de la Fundación, no es ya que aceptaría donativos para incrementar el capital de la misma, sino que sinceramente agradece todo donativo que se le haga por pequeño que éste parezca, máxime siendo que ese cinco por ciento del saldo activo del balance de la Federación, en estos dos últimos años no ha existido, a excepción de, en el servicio de venta de libros.

Es verdad que los legados hechos a la Fundación para instaurar premios, pasan a ser capital de la Fundación, pero van condicionados a un premio determinado y que lleva el nombre del donante.

Por último, doy las gracias al donante anónimo de Madrid que ha enviado 400 pesetas para la Fundación y a Rafael Gastón de Zaragoza que ha dado 100 pesetas.

INÉS GASTÓN

Secretaria de la Fundación ESPERANTO

A petición de varios esperantistas se han mandado hacer medallas conmemorativas de la Fundación, cuyo precio será 250 pesetas. Doy las gracias al señor Sender Brota que ha regalado a la Fundación el troquel de la medalla, con este objeto.

## KONKURSO

La Patronaro de Fonduso ESPERANTO decidis organizi konkurson por premii per

### PREMIO "CASANOVAS-FERRANDIZ"

la esperantist(in)on, kiu plej sindone kaj kun plej bonaj rezultoj sin dediĉis lernigi Esperanton.

La premio konsistas el 5.000 pesetoj, kun konfirma diplomo kaj memoriga medalo

#### REGULARO

1. La konkursantoj devas esti membroj de Hispana Esperanto-Federacio.
2. La konkursantoj devos prezenti sian faritan laboron kaj rezulton atingitan, antaŭ la 15-an de novembro 1972-a.
3. La meritojn de la aspirantoj ekzamenos kvalifikita juĝantaro.
4. Okaze de samnivelaj meritoj, ricevos la premion, tiu kiu pli da membroj aliĝis al la Federacio dum la kuranta jaro.
5. La Verdikto publikigos okaze de la Tago de Zamenhof, la 15-an de decembro 1972-a.

Kun la indiko: Por la Konkursado de Fonduso ESPERANTO, Premio "Casanovas-Ferrándiz", oni sendu la dokumentarojn al: F-ino Inés Gastón, Sekretariino. Paseo Marina Moreno, 35, 4.º dcha. Zaragoza.



## MIA AMIKO LA LIBRO

La libro estas mia amiko. Amiko sub multaj formoj, sed amiko ĉiam. Kelkfoje ĝi min instruas; kelkfoje ĝi min distras, same kiel la amiko el karno kaj ostoj, kies konversacio tiel multe plaĉas; kelkfoje ĝi min ravas per la ritmo de sia poezio, kiel sorĉa lulkanto... Jes, ja, mi scias: kelkfoje la libro ankaŭ ŝokas kaj skandalas, (eĉ se ĝi sin vestas per la tiel nomata "nova rakont-arto") kiel la persono, kiu asertas esti nia amiko kaj nin tentas, kaj kiun ni devas ignori malgraŭ lia surfaca simpatio.

La libroj povas esti sengarnaj, en modesta bindo, kiel la amikoj simplaj, kies humila aspekto igas ilin singenaj, ĉar ili pensas, ke ili vidiĝas en malsupera situacio rilate al la ceteraj personoj. Ekzistas ankaŭ libroj luksaj, kiel la amikoj al kiuj plaĉas porti ĉiam la plej lastamodan veston. Kaj libroj malnovaj, plenaj de rememoroj, similaj al la libro menciita de Menéndez y Pelayo en ties "Epistolo al Horacio": *Mi konservas kun amo libron oldan...* Jes, kun amo, ĉar temas pri malnova amiko, kaj amikoj tiaj ne havas prezon. Kaj ekzistas ankaŭ freŝaj libroj, kies prozo aŭ poezio igas nin elvoki la nunan junularon.

Kelkaj timis, ke la aktualaj rimedoj de informado sukcesus elimini la librojn el nia vivo. Sed, ne. Unue, ĉar la libroj estas diskonigiloj malsamaj je la aliaj diversaj sistemoj de sciigado, kaj kiam oni transplantas la enhavon de libro al iu ajn el la novaj sistemoj, la adapto pruviĝas nekontentiga. Oni memoru, por ekzemplo, pri la verkoj pensitaj kaj skribitaj por la teatro, kaj pri iliaj versioj filmaj aŭ televidaj. Kaj pri la romanoj, kies versioj vidiĝas poĉapitre en la televido kaj kiuj konservas el la originaloj apenaŭ nur la intrigon.

Sed, krome, romano tiel prezentata en la televido ne povas esti amiko nia; same kiel ne povas esti nia amiko la persono kun kiu ni okaze interŝanĝas kelkajn vortojn sur la strato, kaj kiun ni renkontos poste neniam. Kontraŭe, la libro kuŝas ĉe la atingo de nia mano kaj ni povas laŭvole rekontakti ĝin, meti ĝin sub la brakon, same kiel oni metas la brakon de amiko sub la nian, kaj promeni kun ĝi eble por mediti, eble por revii...

MIGUEL SANCHO IZQUIERDO

---

## KONKURSO

### «PREMIO FRANCISCO MAÑEZ»

Ci-jare oni ĝin aljuĝos, en la valoro de 2.000 pesetoj kun konfirma diplomo, al la plej bona artikolo en Esperanto pri la temo:

"Metodoj por la plej efika disvastigo de Esperanto"

#### REGULARO

- 1) La konkursantoj devas esti membroj de Hispana Esperanto-Federacio.
- 2) Oni sendu po kvar ekzemplerojn de la artikoloj tajpitaĵoj laŭ duoblaĵ interlinioj.
- 3) La konkursaĵoj devos esti subskribitaj per pseŭdonimo por kaŝi la identecon de la konkursanto kaj en aparta koverto, sur kiu devos esti skribita la identiga pseŭdonimo, oni sendu la nomon kaj la adreson.
- 4) Kiam publikiĝos la Verdikto, publikiĝos samtempe la nomoj de la juĝintoj.
- 5) La dat-limo por sendi la konkursaĵojn estos la 15.<sup>a</sup> de oktobro 1972.<sup>a</sup>.

Kun la indiko: Por la Konkurso "Francisco Mañez", oni sendu la tekstojn al: S-ro.

Emilio Gastón, P.º Marina Moreno, 14, 3º dcha. Zaragoza.

La Verdikto publikiĝos la 18-an de decembro 1972-a.

Zaragoza la 5-an de majo 1972.

EMILIO GASTÓN  
Sekretario de la Konkurso



Kiam ni preparas la viziton al tiu bela regiono de la norda Hispanujo, venas al nia menso la rememoro pri tri virinoj, kiuj lasis sian spuron en sia verko, kaj kiuj signis vojon en la literatura kampo.

Concepción Arenal, Rosalía de Castro, Emilia Pardo Bazán.

Concepción Arenal naskiĝis en El Ferrol en 1823 kaj mortis en Vigo en 1893, Ankoraŭ ŝi estis tre juna, kiam la familio translokiĝis al Madrid, kie ŝi elmontris sian pasion pri diversaj studoj; sed, nur post ŝia edziniĝo (1847), aperis ŝiaj skribaĵoj kunlabore kun ŝia edzo, —advokato kaj fama verkisto—, en la gazeto “Iberia”, la plej grava politika periodaĵo de tiu epoko. Ankaŭ en tiu epoko aperis ŝia unua romano “Historias de un corazón”, sekvis ĝin “Fábulas en verso” (1851), kiu evidentigas ŝian grandan observeman talenton pri la reala vivo.

Post la morto de sia edzo, ŝi revenis al Galegujo, retiriĝis de la socia vivo kaj sin dediĉis plibonigi la vivon de la malfeliĉuloj same per siaj verkoj kiel per siaj agoj. Ŝi organizis virinan helpan asocion, kiu sin dediĉis viziti kaj instrui la malliberulinojn; ŝi fondis asocion nomatan “La constructora benéfica” por la konstruado de domoj por laboristoj, ktp.; ŝi postenis kiel ĝenerala inspektorino de prizonoj en 1864 kaj poste dum la regado de la Reĝo D. Amadeo kaj dum la unua Respubliko.

En Eŭropo oni ŝin konsideris kiel aŭtoritatulinon pri prizon-aferoj. Ŝi sendis siajn kontribuojn al la Kongresoj prikarceraj de Stockholm, Roma kaj San Petesburgo. Ŝi estis virino de eksterordinara talento, tion pruvas la fakto ke la Asocio Howard de Londono por la reformo de prizonoj, nomis ŝin korespondanta membro.

La libroj de tiel elstara verkistino estas sugestaj, sinceraj, kvazaŭ verkitaj de kiu, anstataŭ pensi pri si mem, nur pensas pri la personoj, por kiuj ŝi skribas; ŝia stilo estas konciza, energia kaj eleganta en sia simpleco, ŝiaj citaĵoj estas frazoj, kiujn ŝi aŭdis de malfeliĉuloj. Frazoj forprenitaj de suferranta koro aŭ de lipoj, kiuj singultas pro doloro aŭ pento. Estas malfacile trovi personon, kiu superus ŝin en la arto esprimi per mallonga frazo iun ajn ideon. Ekzemple, por difini ke nenion valoras la fido sen agoj, la kulto sen moralo, la liturgio sen virto, ŝi skribis tiun belan frazon: “Ne estas pli pia tiu, kiu pli parolas pri Dio, sed tiu, kiu malpli ofendas Lin”.

Sia zorgo pri la sociaj problemoj enkadriĝas en bonfaremo de longa tradicio stimilita de la Eklezio; al tiu orientiĝo respondas kelkaj el ŝiaj plej konataj verkoj. Inter ili ni citos: “Cartas a los delincuentes”. “La mujer del porvenir”, “Cartas a un obrero”, “Cartas a un señor”, “Estudios penitenciarios”, “El delito colectivo” kaj cetera.

En Vigo, kie ŝi mortis, ni povos admiri la tombo-monumenton, kiu konservas la cindron de tiu eminenta, profundpensa virino.

Rosalía de Castro, elstara figuro de la reviviĝo galega de la XIX<sup>a</sup> jarcento, naskiĝis en Santiago de Compostela en 1837 kaj mortis en Padrón en 1885.

En la jaro 1857, oni publikigis ŝiajn unuajn versojn en “El Museo Universal”; en tiu sama jaro aperis ŝia unua libro titolita “La flor” poemoj en kastilia lingvo laŭ la stilo de Espronceda.

La influo de Murguía, —galega ĵurnalisto kaj elstara figuro en la politika kaj kultura revivigo de Galegujo, estis decida en la literatura vivo de Rosalía de Castro. Post publikigo de ne gravaj romanoj, en 1863 aperis ŝia volumeto de poezioj ankaŭ en kastilia lingvo, titolita “A mi madre”, en kiu ŝi montras tion, kio fine estos ŝia ĉefa temo: la soleco kaj la viv-angoro. En tiu sama jaro aperis la unua el ŝiaj verkoj en galega lingvo: “Cantares gallegos”, surbaze de la

folkloro. En la verko de la poetino estas tiel granda ŝia identeco kun la popola spirito, ke multaj el ŝiaj poemoj restis kiel kanzonoj de la viva folkloro galega. Krome, en la libro estas poemoj, kiuj aldonas novan elementon: patriotan sopiron, akuzon kontraŭ sociaj maljustoj, voĉon de protesto kaj kred-konfeso. "Cantares gallegos" estas la unua libro, kiu aperis en galega lingvo en la XIX<sup>a</sup> jarcento kaj renovigas tradicion de literatura uzo de la galega lingvo, kiu praktike ĉesis en la XV<sup>a</sup> jarcento. Difinita celo de Rosalía estas la reaktivigo de la lingvo, kio donas propran sencon al ŝia verko, super ĉio se oni konsideras ke, kiam ŝia libro aperis, estis nekonata en Galegujo la lirika tradicio galega-portugala de la mezepoko. Ŝi estis konvinkita, ke, per ŝia laboro, lingvo sen skriba tradicio radikigos en la literatura lingvo.

Sia plej grava verko en galega lingvo estis "Follas novas", poezio de metafizika radiko en kiu la aŭtorino esprimas temojn kaj problemojn de ekzistencialisma radiko: la soleco (la saudade), ne kiel akcesora situacio, sed kiel homa kondiĉo. En "Follas novas", estas ankaŭ poemoj de akuzo rilate al la problemoj de la elmigrado; problemoj, kiun ŝi pritraktis ĝisfunde, kaj kiu faris el Rosalía la unuan socian poeton de Hispanujo.

Rosalía de Castro estis fundamenta poeto de la galega liriko nuntempa; ŝia verko, nekomprenita en ŝia epoko, atingis koincide kun la generacio de la 98<sup>a</sup> la rekonon fare de la kritikistoj, kiuj substrekis ĝian teman kaj teknikan novecon.

Emilia Pardo Bazán estis sendube unu el la plej elstaraj hispanaj verkistoj de la XIX<sup>a</sup> jarcento. De sia infanaĝo ŝi elmontris sian literaturan emon. Ne estas facile difini la personecon de la fama verkistino, kies stilo estas tre diversa. Ĉirkaŭ ŝia nomo kaj ŝia verko la pasio multfoje superbordiĝis kaj malkvietiĝis kiel maro.

Sia verko estas klara konfeso de naturalismo. La romano "Los pazos de Ulloa" atingis sendube plej grandan sukceson inter la romanoj de la Grafino Pardo Bazán.

Ŝi estis entuziasma feministino kaj multe laboris por la disvolvigo de la feminismo en Hispanujo. En la jaro 1892, ŝi apartenis al la organiza komisiono de la Pedagogia Kongreso Hispana-Portugala-Amerika, al kiu ŝi prezentis sian Raporton titolitan "La edukado de la viro kaj la virino; ĝiaj diferencoj". Multajn prelegojn ŝi faris, inter kiuj elstaras: "La revolucio kaj la romano en Rusujo", "La franciskanoj kaj Kolombo", "Hispanujo de hieraŭ kaj hodiaŭ".

La graveco de Emilia Pardo Bazán en la moderna literaturo estas tiel granda, ke oni ne povos verki historion pri la nuntempa literaturo ne dediĉante grandan spacon al la eminenta verkistino.

INÉS GASTÓN

---

## HISPANA TURISMA ESPERANTA SEKCIO

La 27-an de marto okazis la Ĝenerala Kunsido de H. T. E. S. sub prezido de F. Ino Gastón post legado kaj aprobo de la raporto prezentita de la Sekretariino, oni ankaŭ aprobis la kontojn, kaj oni pritraktis la konsiston de la nova estraro, kiu restis la sama kiel en antaŭaj jaroj; ĉiuj estraranoj estis reelektitaj por daŭrigi en siaj postenoj.

Unuanime oni decidis nomi Delegiton de Hispana Turisma Esperanta Sekcio por la norda parto de Hispanujo, al S-ro Luis de Otaola Faón el Bilbao, kiu de nun havas rilate al H. T. E. S. samajn devojn kaj rajtojn kiel la ceteraj estraranoj.

Tuj sekve oni pritraktis la aranĝojn organizatajn kaj organizotajn dum la kuranta jaro, pri kiuj siatempo ni informos en BOLETIN.

Per varmeta pluv' aŭroro lavis la vizaĝon teran.  
Tuj ekbrilis la ĝardenoj kaj la mont' en malproksim',  
Kune kun la najtingaloj venis la printemp' fiera.  
La rivero ŝveliganta jetas ondojn en deprim'.

La tapiŝon novan sternis la herbejo bunt-kolora,  
ĝin ondigas suda vento —spir' printempa de l' natur'—  
por indulgo petas varme ĉiu flekstalia floro  
kaj la suno strebas plantoj en senĉesa la konkur'.

En la malvarmet' ebriigita mi de bonodoro  
paŝas mi facile, kiel bubo ĝojas mi —irant'—  
pro ĉiela bluo, pro la vivo en burĝon' kaj floro,  
pro la tago instiganta gajajn birdojn al la kant'.

Kvazaŭ blankaj lampoj, kiuj je la verdaj lustroj pendas  
floroj de kaŝtanoj parkaj — surŝutitaj en kaos'.  
En la nokt' arĝenta luno super ili lumon sendas,  
dum la tag' freŝigas ilin nuboj per kristala ros'.

Kune kun mi ankaŭ ili maljuniĝis. Sed sen fino  
ĉiam juna restas la bruanta hom-rivero ĉi  
de junuloj sveltaj kaj bunt-robaj junulinoj  
por ke dum vespero gaje bordon superversu ĝi.

Pli da ĝoj' kaj pli da forto, viv' promesas en abundo —  
la plej malproksiman stelon se ĉiele vidas vi;  
se vi aŭdas flustron mildan en arbara la profundo  
de insektoj la malgrandaj, de kalikoj kaj foli'

Tute fremda estas laco al la koro malkvieta.  
Dum juneco nia en kapturino ĉio flugas for,  
ĉe la penso de junulo estas tre kuraĝimpeta —  
donu al ĝi nur liberon kaj celrevon al la kor'.

Tiam la flugilojn ĝi en facileco ja eksvingos —  
ĉirkaŭiros ĝi kvinoble tra tutmondo kun spertec',  
kaj por sia soifeco klaran fonton ĝi atingos —  
ĝi traboros vojon supren — vojon al la eternec'.

Sed la vivo tiel estas aranĝita — fino venas —  
kiel en infan-fabeloj tagoj flugas for de ni...  
Ho juneco, cent' da jaroj sin daŭrigu vi almenaŭ  
por ke dum jarcent' mi amu mondon karan tiun ĉi.

# LA CIGANA BUBO EN LA NORDO

GIEBEL

ESPERANTO GRUPO

CALLOSA DE SEGURA

Asociación HISPANICO

For en Sud', bel-Hispanio,  
mia kara patroland'.  
Ombras kaŝtanarboj tie,  
plaúdas mar' ĉe Ebro-strand'.

Tie la migdaloj floras,  
plenabundas vito-ter';  
tie rozoj dolĉodoras,  
lumas sun' en blua sfer'.

Nun mi vagas kun gitaro,  
lacapaŝe, strat-post-strat'.  
Min neniú okulpáro  
ekrigardas kun kompat'.

Oni priavaras monon;  
grumble for-ordonas min  
min, la povran, brunan homon  
malŝatadas ho, sen fin'!

La nebulo min deprimas  
ĝi la sunon baras for.  
Kanti jam ne plu kutimas  
mi el gaja, varma kor'.

Sed anime monotonas  
sopirplena vea plor':  
Ĝi min ĉiam plu admonas  
"Al la land' de suna glori!"

Ardo mia ne forpasos!  
Ĝin mi ne subpremu plu!  
Nunan teron mi forlasos:  
Ire al ĉiela blu'!

Ek al Sudo! Land' Hispana!  
Al la land' de suna bril'  
Ombre sub arbar' kaŝtana  
dormos mi, Hispana fil'!

Trad. F. R. BANHAM  
MELBURNO

Giebel estas germana poeto, ne tre konata.  
Originala titolo: Der Zigeunerbube im Norden.

### RENASKIĜO DE ESPERANTO EN MENORCA

Post adekvata propagando kaj informado pri Esperanto pere de ĵurnaloj kaj en diversaj instancoj, la 3-an de majo, nia samideano S-ro Antonio Tuduri prelegis pri Esperanto en "Casa de Cultura" de San Luis de Menorca, oficiala ejo, kiu dependas de la Ministerio. La preleganto sin prezentis kiel Delegito de UEA en tiu bela insulo. La prelego vekis grandan intereson pri Esperanto kaj je la fino, la Direktoro de tiu oficiala Centro petis de S-ro Tuduri ke li pretigu novan paroladon, ĉar evidente la temo interesas al la insulanoj.

La ĵurnalo aperigis intervjuon kun S-ro Tuduri kaj raporton pri la prelego.

### PRELEGO PRI JAPANUJO EN VALLADOLID

La 4-an de majo mi havis okazon partopreni en la sidejo de la Grupo "Fido kaj Espero" de Valladolid, agrablan kunsidon organizitan por ke S-ro Gil Contreras rakontu al la membroj de la Grupo kaj simpatiantoj, siajn impresojn okaze de lia vojaĝo al Japanujo.

Nia samideano komencis sian paroladeton dankante al D-ro Zamenhof tiun mirindan interkomprenilon, kiu estas la internacia lingvo Esperanto. Tuj sekve, S-ro Gil Contreras klarigis al ni diversajn aspektojn de la vivo de tiu interesa lando, kies moroj kaj tradicioj estas tiel malsamaj al la niaj. Li montris al ni fotojn kaj broŝurojn ja interesajn, kaj je la fino li legis leteron de Profesoro de la Medicina Fakultato de la Universitato de Granada, kiu dankas al S-ro Gil Contreras pro la helpo ricevita dank' al Esperanto dum ilia restado en Japanujo.

Antaŭ ol la parolado de S-ro Gil Contreras komenciĝis, ni vizitis la Grupejon, kiu situas en la centro de la urbo, kaj kies diversaj salonoj komforte meblitaj invitas al laboro.

Mi deziras al niaj samideanoj el Valladolid grandan sukceson en ilia por Esperanto-laboro.

I. G.

### ANEKDOTOJ

#### LA NAZO DE LA "DAVID" DE MIGUEL ANGEL

Jus la mirinda verko estis finita, la tuta Respubliko de Florencia priokupiĝis kaj diskutis pri kie oni devis loki la ĵam faman "David"-n; en la debatoj intervenis la plej famaj viroj de Florencia, kiuj prave balotis favore al la "Loggia del Lanzi". La transporto okupis la tutan loĝantaron dum tri tagoj kaj noktoj. Kiam la statuo estis jam lokita, Petro Sonderini rimarkigis al Miguel Angel la ekscesan volumenon de la nazo, kaj la skulptisto, prenis kaŝe manplenon da marmora pulvoro, simulis iom ĉizi, kaj post tio petis al Sonderini ke li juĝu la efekton. La sagaca kritikisto respondis: "Mirinde!... vi donis al ĝi la vivon!".

#### LA LAZARONA ALMOZULO

Dekkvinjara knabo alproksimiĝis surstrate al sinjorino kaj petis de ŝi kvin stelojn kiel almozon.

—Nu! Kvin stelojn?! —ŝi respondis mirigite— Kian almozmanieron do, vi praktikas?

—Sinjorino —respondis la knabo— ĉar vi neas ilin al mi, mi ne ĝenos alian personon: per tiu malgranda kvanto mi povus rezigni decidon, kiun nun mi devos fari. Kaj tion dirinte li profunde sopiris kaj foriris plorante.

—Nu! —diris la sinjorino al sia akompanantino— ĉu tiu malfeliĉulo havas intencon kiu igos lin fari sensencaĵon? Mi ne volas ke pro kvin steloj tiu malfeliĉulo malvirtigu.

La sinjorino vokis lin kaj diris: —Jen, kvin steloj por vi; sed diru al mi, kial vi tiom afliktiĝis kiam mi neis la almozon al vi?

—Sinjorino, ĉar mi pensis ke mi nepre devus labori.

Estas tiel interesa, tiel mirinda, kaj ankaŭ tiel admirenda, ĉi tiu lando, ke mi opinias, certe valoras laciĝi iomete kaj fari la elspezojn kiujn postulas ĉi tiu veturado.

Kvankam mi ne estas verkisto, nek tiun metion mi intencas atingi, puŝate de la multaj mirindaĵoj, kiujn mi spertis dum mia tre mallonga restado, nur dekkvin tagojn, en tiu orienta lando, mi kuraĝas skribi ĉi tiujn liniojn per kiuj mi celos nur raportojn el miaj travivaĵoj esperantistaj. Mi bezonus grandan libron por klarigi surface la tradiciojn kutimojn, belegajn kostumojn, bongustajn manĝaĵojn, ktp. de tiu ezotika lando, same kiel pri ĝiaj sanktejoj, pejzaĝoj, luksegaj hoteloj, en kiuj mi havis la bonŝancon tie ripozi, ĝui kaj distri min.

Se ni nur konsideras la Esperantan flankon de tiu ĉi vojaĝo, mi devas sciigi al vi, ke mi ĉiam supozis, de kiam mi esperantistiĝis, la avantaĝojn, kaj helpon, kiujn la kono de tiu ĉi facilega lingvo kunportas. Iujn el tiuj avantaĝoj mi jam spertis antaŭe, helpante finlandanojn, nederlandanojn, polojn, ktp.; sed, dum mia vojaĝo en Japanujo, ne nur ekzistis helpo al mi, tute ne, tion mi ne povas nomi helpo, tio estis vera frateco.

Mi rakontos skize miajn interrilatojn kun la japana esperantista popolo, kaj kiam vi legos ĉi tiun artikolon vi mem juĝos.

Antaŭ du jaroj, ĉarma japana esperantisto, F-ino Tsune Yamamoto, vizitis nin en Valladolido; mi, same kiel la ceteraj esperantistoj de la Grupo "Fido kaj Espero", akompanis ŝin kaj klopodis faciligi kaj plezurigi ŝian restadon inter ni. Mi skribis al ŝi, sciigante miajn liberajn tagojn en ŝia grandega urbo Tokio, kaj la hotelo kie mi loĝos, "Imperial Hotel". Unu tagon vespere, nia amikino akompanata de S-ro Misudi kaj alia esperantista junulo, sin prezentis antaŭ mi. Ni interparolis en unu el la dudek belaj salonoj de la hotelo kaj ni interakordis ke la sekvontan matenon je la deka, nia amikino renkontu kaj akompanu min tra Tokio. Kun la kutima akurateco de la japanoj, sin prezentis mia amikino, la tutan tagon ŝi akompanis min; ŝi montris al mi multajn belajn

aspektojn de la urbo; ŝi regalas min per tipa japana tagmanĝo en japana restoracio kaj per karafo de la japana vino "suke". Vespere, S-ro Niŝiumi invitis min en la Universitata festo okaze de la fino de la kurso, ĉar li profesoras en la Universitato de Tokio. Poste mi partoprenis la kunvenon de la Zamerhofa Grupo, la gegrupanoj faris al mi kelkajn demandojn, kiujn mi volonte respondis, kaj ni havis ne lunkon, sed veran vespermanĝon, trinkante sukeon. Tie, en vere amika etoso, oni konsideris min kiel iun ajn el ili, kaj oni donacis al mi esperantan tradukon de Nobel-premiita japana verkisto.

Ankaŭ alian por mi liberan tagon, denove min akompanis F-ino Tsune, tra la stratoj de Tokio, kaj ni vojaĝis per la nepriskribebla subtera fervojo. Sed, tiu ĉi fraŭlino ne limigis sian afablecon al tiuj komplezoj, ŝi kaj unu el siaj amikinoj, bela kiel porcelana statueto, donacis al mi unu el miaj plej karaj memoraĵoj el Japanujo. Ambaŭ devigis min sidiĝi antaŭ tablo por vespermanĝi tipan ĉinan vespermanĝon. Ĉu vi ne imagis iam manĝi ĉinajn manĝaĵojn, ĉirkaŭate de ravaj knabinoj, per buntaj kimonoj vestitaj?

En aliaj urboj, okazis same; kaj, kion mi povus diri pri la geamikoj de Osaka? Kaj de S-roj Shindo kaj Kusuda? Se mi intercus priskribi ilian komplezemon al mi, ĉi tiu artikoleto ne havus finon. Sed ili scias, ke mi ĉiam memoros la afablecon kaj ĝentilecon de la japana esperantistaro. Miaj gekunvojaĝantoj enviis min, kaj multaj el ili petis de mi, ke mi estu ilia akompananto, por tiel faciligi ilian restadon en la lando; tiamaniere, ili povis manĝi en bonaj kaj malmultekostaj restoracioj, aĉeti en konvenaj butikoj, spekti tipajn prezentojn aŭ simple promeni, sciante sur kiu strato oni iras.

Mi atingis ĉi tion dank' al nia lingvo kaj al la interna ideo, kiu devas movi ĉiujn niajn agojn. Ni, —kaj mi ne deziras enuigi iun—, havis la mirindan ekzemplon de niaj japanaj geamikoj.

Imitu ilin kaj ni pruvos kiel altega estas la gravo de la esperatisteco!!!

Gis ĉiam, japanaj geamikoj.

A. GIL CONTRERAS

# FEDERACION ESPAÑOLA DE ESPERANTO

## CUENTA DE RESULTADOS

Saldo al 31-XII-1970 .....	107,70	
<i>Cuotas y donativos 1971</i> .....	106.585,—	
<i>Cuotas Dumvivamembroj</i> .....	20.000,—	
<i>Intereses cuentas corrientes Bancos Santander y Español de Crédito</i>	150,61	
<i>Congreso de Alicante:</i>		
Saldo resultante .....	5.698,—	
Derechos de examen .....	850,—	6.548,—
<i>Subvención Ministerio de Educación 1971</i> .....		20.000,—
<i>Local Secretaría Permanente:</i>		
Subvención Ministerio Educación 1970 .....	98.000,—	
Donativos para F. A. L. P. ....	77.100,—	175.100,—
	<hr/>	<hr/>
		328.491,31
<i>Gastos de Secretaría</i> (sellos correo, circulares, cartas, impresos, etc.)		7.465,—
<i>Gastos de Tesorería</i> (sellos, tarjetas de acuse de recibo, giros, reembolsos, etc.) .....		4.100,23
<i>Gastos «Boletín»:</i>		
Facturas Imprenta Boloix:		
Núm. 11/12 de 1970 .....	11.263,—	
6 números de 1971 .....	85.740,65	
Sellos correo, sobres, etc. ....	6.689,20	
Gratificación al Director (1971) .....	1.000,—	
Donativo Campaña Navidad .....	400,—	105.092,85
	<hr/>	
<i>Cuota de U. E. A. 1971</i> .....		3.920,—
<i>Material de propaganda</i> (adquirido a Eldona-Fako y Libro-Servo ...		5.504,—
<i>Gastos instalación de la Secretaría</i> (mesa, sillas, instalación eléctrica, etc.) .....		13.840,—
<i>Adquisición local para Secretaría:</i>		
Entrega inicial .....	100.000,—	
Timbre letras pago aplazado .....	4.480,—	
Pago de 2 primeras Letras de 7.775,— ptas. ....	15.550,—	120.030,—
	<hr/>	
Resultados .....		68.539,23
		<hr/>
		328.491,31

Gerardo Flores



## BALANCE-INVENTARIO

### *Disponible*

En Caja y Bancos de Santander y Español de Crédito ... .. 68.539,23

### *Exigible*

Fianza Unión Eléctrica, S. A. ... .. 1.160,—

### *Realizable*

Existencias de Libro-Servo ... ..	78.715,—	
Material de oficina (tarjetas, cartas, sobres, impresos reembolso, sellos, etc.) ... ..	3.500,—	82.215,—

### *Inmovilizado*

Local en propiedad ... ..	600.000,—	
Mobiliario adquirido ... ..	6.400,—	
Idem donado por los s-anoj Figuerola y Flores ... ..	20.000,—	
Instalación eléctrica ... ..	3.900,—	630.300,—
		782.214,23

### *Exigible*

Efectos a pagar en 5 años (incluidos intereses) ... ..	485.950,—	
Hipoteca a favor de la Caja de Ahorros y Monte de Piedad (amortizable en 10 años) ... ..	92.500,—	
<i>Patrimonio de la Federación en 31 de diciembre de 1971</i> ... ..	203.764,23	
		782.214,23

*Gerardo Flores*

## \* *Ni legis por vi ...*

INVIT' AL JAPANESKO, de Masao Miyamoto. Originala poemaro. Kovrilo de Jan Schaap Jr. Eld: J. Régulo (Stafeto. Beletraj Kajeroj) La Laguna, 1971. 110 paĝoj, 22 × 15 cm. Broŝurita. Prezo: 140 ptoj.

Jam de multaj jaroj oni provas enhejmigi en nian lingvon la plej tipajn formojn de la japana poezio, ĉefe la hajkon kaj la utao. Gabrowski, Kalocsay, Waringhien, Tarkony, Maŭra, Ossaka, Mattos kaj aliaj metis la teknikajn bazojn de la transplantado kaj verkis pecojn tradukitajn kaj originalajn, el kiuj kelkaj estas veraj juveloj de la Esperanta poezio. Ŝajnas tamen, ke Masao Miyamoto per *Invit' al Japanesko* definitive fiksas la formon en Esperanto de la hajko kaj de la utao; la hajko per tri versoj 5, 7, 5 — silabaj kun rimado sur la unua kaj lasta, kaj la utao per 5, 7, 5, 7, 7 — silabaj versoj kun rimado de la dua aŭ tria versoj kun la lasta. Miyamoto ne allasas viran versfinon, kio ŝajnas imitinda kaj konforma al la esenco de tiel delikataj versaĵoj.

Pro la brilaj solvoj teknikaj de Miyamoto en la redono de prozodiaj strukturoj tiel fremdaj al Esperanto, *Invit' al japanesko* certe havas konsiderindan valoron. Krome, la eksterordinara 'senkarneco' de hajkoj kaj utaoj postulas plejan koncizigon de la ideoj, sekve majstran manipulon de la lingvo, por ke la freŝo de la inspiro ne perdiĝu en la obskuro de troa lakoneco. Miyamoto eminentas, uzante la lingvon, kaj, kiel Auld prave diras en la antaŭparolo de la libro, 'li estas absoluta majstro de sia esprimilo' kaj 'dibočas libere per magiaj vorteblecoj'.

Efektive la libro estas fascina ekzemplo kaj superba pruvo de la fekundo ankoraŭ latentata en Esperanto. Ni legu, ekzemple:

*Alteoj alte  
alee aprezindas;  
aŭgusto alde.*

*Ha, transfenestras  
la frost' en la vagonon;  
neĝblanko estras.*

Bedaŭrinde la inspiro de Miyamoto ofte estas nek tiel profunda, nek tiel subtila, kiel lia scio de la lingvo. La

elvokiva kaj sugesta aromo karakteriza de la hajkoj jam de la tempo de la genia Baso (1644-1694) mankas pli, ol oni dezirus en *Invit' al japanesko*. La pliparto de la hajkoj de Miyamoto (la samon oni povas diri pri liaj utaoj) portas malmulton *esence* poezian. Ili estas, ne kvintesencaj de raraj parfumoj, sed banalaĵoj en brila vesto montrantaj admirindan virtuozecon teknikan kaj lingvan, sed ne lirikan.

Kiam Miyamoto trafas la ĝustan klavon, la efekto estas tre bela. Ekzemple:

*Rimors' rampanta,  
kun olda muŝo vintra  
sunbane lanta.*

*Ĉe flag' en flirto  
forsvenis mia morno;  
ho, soras birdo.*

Apud tiel ĉarmaj hajkoj, kiuj tuŝas al ni en la senton per siaj sugestaj transfundoj, multaj aliaj pecoj ŝajnas simplaj konstatoj mankaj je subsenco kaj eĉ je inspiro. Ekzemple:

*Venis sen ĉes' tra  
maja nokto miaŭĵoj  
de sub' fenestra.*

*Ĉe suda maro  
tapiŝas flave klifon  
jonkvila aro*

kaj tiaj hajkoj danĝere proksimiĝas al la vulgara etoso de la senrjuoj, sed sen ties humuraj elementoj.

Resume? Libro grava, bela kaj akirinda pro ties lingvo kaj poetika tekniko kaj pro la iomo da vera poezio en ĝi sidanta. Masao Miyamoto estas sentiva poeto, tial, ni rajtas peti de li verkon ne nur forme kaj lingve brilan, sed ankaŭ interne kaj koncepte poezian.

F. DE DIEGO

LAŬTEMA VORTARO: ESPERANTO, ENGLISH, FRANCAIS, ESPAÑOL, de 'Ergoto'. Eldono de la aŭtoro. Buenos Aires, 1972. 234 paĝoj, 12 × 17,2 cm., broŝurita. Prezo: 210 psetoj.

Tiaspeca libro povas esti utila speciale al tradukistoj kaj interpretistoj, se oni ĝin preparis konforme al preciza kaj sistema planado kaj aranĝo. Diras la aŭtoro, ke, "se oni volas scii, kiel diri *alaŭido* aŭ *biero*, ĉu en la angla, franca aŭ hispana, oni devas serĉi en la indekso 'birdoj' aŭ 'trinkaĵoj', kaj konsulti la koncernan kolum-

non por trovi kun rapido la serĉatan terminon". Nu, mi volis mem kontroli la uzeblon de ĉi tiu vortaro, serĉante la vorton *difekto*, kaj jam dekomence mi vidis min en embaraso. En kiu sekcio de la indekso mi devus serĉi? Post unuhora cerbumado kaj trafolumado mi trovis ĝin en... 'Industrio kaj Komercio', kvankam ĝi kun la sama rajto povus sidi en 'La Homo', 'La Hejmo', 'Vojaĝoj', 'Ilaroj kaj Maŝinoj' ktp. En la sekcio 'Verboj', *difekti* ne troveblas, do mankas ankaŭ la respektivaj formoj en la hispana, angla kaj franca.

Kelkaj novaj provoj kun aliaj ordinarnaj vortoj same fiaskis, tiel, ke mi komencis suspekti, ke 'Ergoto', granda dissemanto de ŝercoj en la Esperanta gazetaro, finfine nur pretendis fari rektan ŝercon al ĉiu konsultanto de sia vortaro.

Laŭteman, ilustritan vortaron hispanan-francan-anglan germanan publikigis en 1957 'Ediciones Daimón' Provenza 282, Barcelona (Hispanujo) tradukitan el la germana *Illustriertes Wörterbuch* (Werlag Lebendiges Wissen, Frankfurt am Main), kies legon kaj aranĝon mi varme rekomendas al s-ro Adán Hryniewicz.

F. DE DIEGO

#### LA GENERALA INSTRUADO EN

V. D. R. Tradukoj el diversaj aŭtoroj.

Fremdlingva eldonejo, Hanojo, 1971. 144 paĝoj, 13 × 19 cm.

Malgraŭ la sanga batalado, kiu jam de 25 jaroj ŝtormas tra Vjetnamio, la ĝenerala instruado disvolviĝas en vere mirigaj proporcioj, se konsideri kiom da obstakloj kaj handikapoj devas superi militanta popolo. Ĉi tiu libro bone prilumas la nunan situacion de la kampo de la edukado en V. D. R., faras rivelajn komparojn kun la panoramo de pasintaj tempoj kaj projektas kun fido kaj optimismo por la futuro. Leginda libro, kies klara, simpla lingvo estas kroma logaĵo.

F. DE DIEGO

RESUMO PRI VJETNAMIO. Fremdlingva eldonejo, Hanojo, 1971. 132 paĝoj, broŝurita, ilustrita, kun faldebla mapo, 19 × 12 cm. Prezo: 48 ptoj.

Jam de multaj jaroj Vjetnamio estas nomo ĉiutage renkontata en la ĵurna-

loj, en la radio, en la televido. Vjetnamio, unu el la tragedioj de nia epoko, influas kaj influos en la monda historio. La sekvoj de la sanga konflikto tie disvolviĝanta certe sentiĝos rekte aŭ nerekte en la ceteraj landoj, eĉ en la malproksimaj.

Ni ĉiuj konas la gravecon de Vjetnamio en la terenoj socia kaj politika, sed kion ni *efektive* scias pri tiu lando-Vere, kaj bedaŭrinde, preskaŭ nenion. *Resumo pri Vjetnamio* donas al ni ĝeneralan bildon pri ĝiaj diversaj aspektoj: geografia, historia, kultura, ekonomia, politika, ktp. kaj, kvankam oni traktas ilin de la vidpunkto de la marksisma dialektiko, la libro entenas sufiĉe da objektivaj, kaj meditigaj, faktoj, kiup rivelas al ni la landon kaj la spiriton de brava popolo meritanta pli bonan sorton.

F. DE DIEGO

#### LA HORLOGISTO DE DJEN BJEN FU

(elektitaj noveloj el la periodo 1945-1964). Tradukis Ng. Minh Kinh (kun la kunlaborado de la esperantistoj de Hanoja Esperanta Klubo). Fremdlingva eldonejo, Hanojo, 1971. 416 paĝoj, broŝurita, 13 × 19 cm. Prezo: 48 ptoj.

En ĉi tiu kolekto da dek naŭ noveloj troviĝas, (inter kelkaj jam antaŭe eldonitaj, kiel *La geedzoj A Fu*) aliaj, kiuj estas novaj por la esperantista publiko.

Tamen ili ĉiuj respegulas la samajn temojn: la revolucion, la rezistadon kaj la konstruadon de socialismo en Vjetnamio. En enkonduka noto, la eldonisto diras kun laŭdinda sincero: "seninterrompa milito, verkistoj plejparte junaj kaj senspertaj, tia estas la situacio de la vjetnama revolucia literaturo, kiu, kvankam disvolviĝanta pli prospere ol antaŭe, tamen faras siajn unuajn paŝojn... Ĝi ne havas la ambicion elmontri elstarajn verkojn".

Eĉ se tiel, la noveloj meritas atentan tralegon, ĉar oni povas eltiri el ili amason da interesaj informoj pri la historio, la moroj kaj la psikologio de la vjetnama popolo, tiel abunde dotita per brilaj kvalitoj kaj kapabloj.

F. DE DIEGO

**TRANS LA FABELOCEANO**, de F. Szilagyi. Eldonis Dansk Esperanto-Forlag, Aabyhoj, 1972. Bindita, ilustrita, mapo, 19 × 12 cm. Prezo: 48 ptoj.

En nia, ni diru, "klasika" literaturo ekzistas veraj juveloj nekonataj de la junaj generacioj de esperantistoj. Laŭdindas do la iniciato de kelkaj eldonejoj (*Stafeto* per "Sekretaj Sonetoj", *Pirato* per "Lingvo, Stilo, Formo" kaj "Historio de la Mondlingvo", *TK* per "Vole, Novele", ktp.), kiuj komencas republikigi la trezoron de la antaŭmilitaj jaroj kaj helpas doni tiel perspektivon pli vastan kaj realan pri nia beletro. Al tiuj eldonejoj nun aliĝas Dansk Esperanto-Forlag per la bela "Trans la Fabeloceano", kiu siatempe trovis sukcesan akcepton, kaj kiu konservas ankoraŭ sian freŝon kaj intereson malgraŭ la multaj jaroj pasintaj ekde ĝia unua eliro. Cetero, Szilagyi estas unu el niaj plej bonaj stilistoj, kaj liaj fabeloj tion facile pravas. Delikate amaraj, subtile pesimismaj, elegante senhuziaj, la fabeloj elspiras la mildan melankolion propran al spirito sentiva kaj profundapensa, kia estis la spirito de Szilagyi. Mi varme gratulas la danan eldonejon pro ties feliĉa ideo denove aperigi la fabelojn de nia hungara "klasikulo". La libro certe meritas amasan legadon.

F. DE DIEGO

**SUNO KAJ PLUVO**, de Gudrun Riisberg. Eldonis Dansk Esperanto-Forlag, Aabyhoj, 1972, broŝurita, 80 paĝoj, 21 × 14,5 cm. Prezo: 130 ptoj.

Jen fasko da rakontoj —15 entute— kies temoj kaj humoroj iras... de la suno al la pluvo, kaj kie ne mankas gutoj da sana ironio. Ŝajnas, ke Dansk Esperanto-Forlag specialigis en ĉi tiu tipo de libroj distraĵoj kaj lingve korektaj, preferataj de publiko, kiu ne volas rompi al si la kapon per transcendantaj verkoj kaj arkanaj poezioj. Al tia publiko *Suno kaj Pluvo* konvenas kiel ringo al fingro. Kaj ankaŭ al lernantoj, kiuj studas jam en progresiga kurso.

F. DE DIEGO

**POR LA PACO**. Diversaj aŭtoroj. Originaloj kaj tradukoj. Eldonis, Komisiono pri Internaciaj Ligoj de Sove-taj Esperantistoj, Moskvo, 1971. Broŝurita, ilustrita. 80 paĝoj, 20 × 14,5 cm. Prezo:

Kajero pri la defendo de Leningrado dum la milito, la renaskiĝo kaj prosperigo de la urbo depost la konflikto, kaj la perspektivoj al la futuro.

F. DE DIEGO

**LEKSIKONO DE OFICIALAJ VORTOJ**. Kompilis kaj eldonis Edward Ockey, 15 Upper Pines, Banstead, Surrey, Anglujo. Kajero 22-pĝa, 15 × 21 cm. Prezo: 35 ptoj.

Kun difinoj en la angla. Eble interesa al esperantologoj. Temas pri konsciencie farita laboro, sed ŝajnas, ke s-ro Ockey ankaŭ amas promeni en la lando de la fantazioj. Diri, kiel li diras, ke "words formed from the 4.535 official Esperanto roots can adequately express the sense of the 414.825 separate words contained in the thirteen volumes of the full *Oxford English Dictionary*" ŝajnas evitenda ekzemplo de malpropagando.

F. DE DIEGO

**BONVENON AL KUOPIO**. — Turisma, informa broŝuro plurkolora kaj faldformata, pri tiu interesa urbo. Mendoj ĉe Turisma servo de Kuopio.

**VICHY**. — Kiel ĉiujare, ankaŭ en 1972 oni eldonis en Esperanto plurkoloran informan broŝuron faldformatan pri tiu famkonata, turisma kaj kuracadloko.

**BULGARIO**. — Turisma informa broŝuro plurkolora, bele prezentita, kun fotoj de diversaj urboj de la lando. Eldonis: Centro por Turisma Reklamo ĉe la Komitato de Turismo.

# ELDONA FAKO DE H. E. F.

Je la dispono de niaj membroj kaj amikoj ni havas jenan liston de Esperantaĵoj:

Mendu ilin tuj mem:

Esperanto-insignoj stelformaj, pinglaj kaj butonaj, unuo ... ..	18,— ptoj
Esperanto-insignoj rondaj, pinglaj kaj butonaj ... ..	20,— "
Esperantaj insignoj glueblaj, rondaj, ovalaj kaj stelformaj, unuo ...	10,— "
Esperantaj flagetoj, silkaj kaj plastaj, unuo ... ..	10,— "
Bulkraĵonoj, 53. <sup>a</sup> U. K. de Esperanto-Madrid, unuo ... ..	10,— "
Kovertoj kun teksto, "Esperanto, La Lengua Internacional", deko ...	5,— "
Kovertoj kun teksto, "Esperanto, Internacia Lingvo", deko ... ..	5,— "
Plurkoloraj bildkartoj, Nia Sinjorino de la Espero, unuo ... ..	3,— "
Bildkartoj, Patro Nia, unuo ... ..	2,— "
Poŝtkartoj kun alegorio, deko ... ..	10,— "
Poŝtkartoj kun Himno "La Espero", deko ... ..	10,— "
Afiŝoj Internaciaj, unuo ... ..	5,— "
Glumarkoj pri la Int. Libro-Jaro 1972, folieto 16 glm. ... ..	8,— "
Glumarkoj de la 57. <sup>a</sup> U. K. de Esperanto en Portland, folieto 10 glu ...	10,— "
Glumarkaj steloj uzeblaj sur korespondado, folieto 35 steloj ... ..	2,— "
Faldfolio por universitatoj, 6-lingva (angla, franca, germana, hispana rusa) informilo ... ..	2,— "
Faldfolio ses-lingva, ĝenerala informilo (angla, araba, franca, germana, hispana, rusa) ... ..	2,— "
ETERNECO, Navarra legendo, de A. Núñez Dubús ... ..	10,— "
FILOZOFIO DE FANTOMO (W. Fernández Florez, tr. L. Hernández)	30,— "
LA LANDO DE ALVARGONZALEZ (A. Machado, tr. F. de Diego) ...	50,— "
BOLETIN extraordinario ... ..	25,— "
BOLETIN normal ... ..	15,— "

Ankaŭ estas je via dispono Insignoj, libroj, afiŝoj, poŝtkartoj, kaj glumarkoj de diversaj Hispanaj Kongresoj, kaj glumarkoj de Universalaj Kongresoj.

Mendoj kaj pago ĉe: Inés Gastón, P.<sup>o</sup> Marina Moreno, 35, 4.<sup>o</sup> dcha. ZARAGOZA.

## DONATIVOS PARA BOLETIN-1972

Suma anterior ... ..	1.762 ptas.		
José M. <sup>a</sup> Goás Chao, Santiago de Compostela ... ..	50 ▶	Ramón Molera ... ..	50 ▶
Antonio Valadas, Luanda ... ..	50 ▶	A. Urgellés de Molera ... ..	50 ▶
Pedro Alcedo ... ..	50 ▶	M. Elézcano ... ..	100 ▶
Salvador Gumá ... ..	50 ▶	J. Figueras ... ..	100 ▶
José Sardá ... ..	50 ▶	J. Monfort ... ..	50 ▶
Manuel Cos ... ..	50 ▶	J. Bernaldo de Quirós ... ..	50 ▶
Antonio Criach ... ..	250 ▶	Angel García ... ..	50 ▶
Jaime Perarnau ... ..	250 ▶	J. Devís ... ..	50 ▶
Tomás Apraiz ... ..	50 ▶	Juan Bosch ... ..	50 ▶
Cecilia G. de Apraiz ... ..	50 ▶	Jacinto Martín ... ..	50 ▶
Eduardo Larrouy ... ..	50 ▶	José Lerroux ... ..	50 ▶
Lea Bernaerts, Bélgica ... ..	30 ▶	Amado Pons ... ..	50 ▶
		Dolores Brugués ... ..	50 ▶
		Antonio Boigas ... ..	100 ▶
		«Stelo de Paco» ... ..	200 ▶
		Total ... ..	3.792 ptas.

## 14<sup>o</sup> BARCELONA - PROVINCA ESPERANTISTA RENKONTIĜO

Okazonta en Rielles del Fai la 18-an de junio 1972

### PROGRAMO

Renkontiĝo de la kunvenantoj ĉe la Paroheja Placo.

Meso kun prediko, ambaŭ en Esperanto, fare de Pastro José M.<sup>a</sup> Clara-munt Sch. P. kaj Pastro Manuel Casanoves C.M.F. en la loka Parohejo.

Generala fotografado.

Inaŭguro de strato "Dro. Zamenhof".

Teatra prezentado en Esperanto, fare de la junulara trupo de Centro de Esperanto Sabadell, en loka Lernejo.

Prezentado de surstrata Esperanto-ekspozicio.

Frateca kunmanĝado en loka restoracio.

Kiel en pasintaj jaroj funkcios stando de Esperantaj libroj.

Informas: Centro de Esperanto Sabadell, str. Gral. Mola n-ro 99, SA-BADELL (Barcelona).

## EXCURSION TURISTICA A VIGO CON MOTIVO DEL 32 CONGRESO ESPAÑOL DE ESPERANTO

La Sección Esperantista Española de Turismo en colaboración con la Delegación de "VIAJES MELIA" en Zaragoza, ha organizado la siguiente excursión con visita a Portugal.

- 17-7-72 ZARAGOZA - SORIA - VALLADOLID  
Por la mañana salida de Zaragoza en autopullman hacia Valladolid, con detención en SORIA para almorzar. Por la tarde continuación de viaje a VALLADOLID. Cena y alojamiento en el hotel.
- 18-7-72 VALLADOLID - BRAGANZA - OPORTO  
VALLADOLID. Desayuno en el hotel. Salida hacia Portugal. Almuerzo en BRAGANZA. Por la tarde se continuará viaje a OPORTO. Cena y alojamiento en el hotel.
- 19-7-72 OPORTO. Pensión completa en el hotel. Día libre para visitar la ciudad.
- 20-7-72 OPORTO - VIGO  
OPORTO. Desayuno en el hotel. Salida hacia VIGO. Almuerzo, cena y alojamiento en el hotel.
- 21-7-72  
a l VIGO. Pensiones completas en el hotel. Días libres para asistir a las
- 25-7-72 sesiones del Congreso Español de Esperanto.
- 26-7-72 VIGO - PONFERRADA - PALENCIA  
VIGO. Desayuno en el hotel. Salida hacia Palencia. Almuerzo en PONFERRADA. Por la tarde continuación de viaje a PALENCIA. Cena y alojamiento en el hotel.
- 27-7-72 PALENCIA - SORIA - ZARAGOZA  
PALENCIA. Desayuno en el hotel. Salida hacia Zaragoza. Almuerzo en SORIA. Por la tarde continuación de viaje para llegar a Zaragoza al anohecer.

Precio de la excursión por persona en habitación doble con baño. 8.465 ptas.

Informes e inscripción en la Sección Esperantista Española de Turismo, Inés Gastón, Paseo Marina Moreno, 35, 4.º, Zaragoza.

## 57<sup>a</sup> UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Okazonta en Portland (Oregon) de la 29.<sup>a</sup>, 7 ĝis la 5.<sup>a</sup>, 8, 1972

Sub la Alta Protektado de Governor Tom McCall

Estro de la ŝtato Oregon

Unua bulteno kun aliĝilo estas senpage ricevebla ĉe la konstanta adreso de la Kongreso, ĉe la peranto, S-ro Ramón Molera, Ĉefdelegito de UEA en Hispanujo, str. Santa Joaquina, 13, MOYA (Barcelona) kaj ĉe la Hispana Esperanto Federacio.

Statistiko (15-5-1972).

750 aliĝintoj el 38 landoj (Hispanoj 12).

## INTERNACIAJ FERIAJ KURSOJ

Okazontaj en Helsingør, Danlando

de la 23.<sup>a</sup> ĝis la 30.<sup>a</sup>, 7, 1972

Dum la semajno okazos jenaj kursoj:


- 1) *Elementa kurso* laŭ metodo Friis.
- 2) *Konversacia kurso*. La gvidantino scias paroligi ĉiujn en gaja maniero.
- 3) *Perfektiga Studrondo*. Stilo kaj formo de nia lingvo estas la ĉefaj temoj.
- 4) *Prepara Kurso por Friis-metodaj ĝeinstruistoj*. Ankaŭ *Ne-Kursanoj* estos kore bonvenaj en ĉi tiu semajno. Sendu vian aliĝon (antaŭ 1/7 72) al s-ro L. Friis, Ingemannsvej 9, DK-8230 Åbyhøj, Danlando.

## EŬROPA ESPERANTO - KONFERENCO

Okazonta en Wien (Aŭstrujo)

de la 23.<sup>a</sup> ĝis la 30.<sup>a</sup>, 7, 1972

Unua bulteno kun informoj kaj aliĝiloj estas riceveblaj en Hispanujo, ĉe F-ino Antonia Lapuerta, str. Maria Lostal 25/5.<sup>o</sup> p. 12, ZARAGOZA.



## 32<sup>a</sup> Hispana Kongreso de Esperanto

Organizita de Hispana Esperanto-Federacio.

Okazonta en Vigo (Pontevedra) de la 20<sup>a</sup> ĝis la 25<sup>a</sup> de Julio de 1972

Adreso de la Organiza Komitato:  
Apartado n.º 555, VIGO

**LOKA KONGRESKOMITATO.** — Honora Prezidanto, Camilo Veiga Prego; Prezidanto, Arturo Moreira Lorenzo; Vicprezidanto, Julio Bueno Cortés; Sekretario, Celestino Pousa Veloso; Kasisto, Pío Moa Banga; Membroj, Amelia Salgado González, Paz García Otero, Lisardo Pérez Pérez, José García Sampedro, Emilio Crespo Cano kaj Efrén Castro Seijo.

**KONGRESEJO.** — “Círculo Recreativo Mercantil e Industrial.”

### PROVIZORA PROGRAMO

INTERKONA VESPERO

SOLENAJ MALFERMO KAJ FERMO DE LA KONGRESO

MESO EN ESPERANTO

EKZAMENOJ

**LABORKUNSIDOJ.** — Krom la Ĝenerala Kunveno de H. E. F., okazos Labor-kunsidoj de la Estraro de H. E. F. kun delegitoj de Grupoj kaj Fakaj Kunvenoj.

**PRELEGOJ.** — Kiel ĉiujare okazos prelego en Esperanto kaj ĉen hispana lingvo.

**EKSKURSOJ.** — Tuttaga ekskurso al Monto Sankta Tecla vizitante Bayona, La Guardia, Tuy kaj Porriño. Dum tiu ekskurso oni vizitos la Votan Templon de l'Maro, la Turisman Gastejo “Grafo de Gondomar” kaj diversajn strandojn. Duontaga ekskurso per ŝipo, vizitante la konservajan fabrikon “Masso”. Post la Fermo de la Kongreso, tuttaga ekskurso al Santiago de Compostela, vizitante Villagarcía de Arosa ka La Toja.

**AKCEPTOJ.** — Akcepto en la Urbodomo. Kaj regaloj de diversaj Instancoj kaj Entrepreneoj dum la tagoj de la Kongresoj kaj dum la ekskursoj.

**FOLKLORO.** — Folkloro galega festivalo en la Parko Quiñones de León.

**VIZITOJ.** — Estas planitaj vizito al Muzeoj kaj diversaj vidindaĵoj de la urbo.